

21.8.80

Kun bedaŭro kaj tristeco mi, Bruno Vogelmann, skribas tiun replikon je la tutpaga publikigo de sinjoro Munniksma en HORIZONTO 28 paĝo 58. Sinjoro Munniksma parolas pri misprezento en mia artikolo en HORIZONTO 26 paĝo 26. Mi klarigas:

1. La leganto bonvolu mem legi en HORIZONTO 26, kion mi prezentis: la simplan fakton, ke mi, estrarano de EKI kaj unu el la aŭtoroj de la IKF okupigas pri novaj eldonoj en aziaj kaj orienteŭropaj lingvoj. Ĉu tio estas misprezento?

2. En linio 9 sinjoro M. pretendas, ke "sinjoro Vogelmann ne informis min... se ne paroli pri mia konsento..." Tiu pretendo estas simple la kontraŭo de la vero. Je 25.6.1979 mi skribis neregistritan leteron al la nederlanda adreso de sinjoro M., kiu letero ne revenis. Do, ĉar la mezeŭropa poŝto laboras tre akurate, kun plej granda verŝajno la letero atingis sinjoron M. Sed tiu ne respondis. Je 14.10.1979 mi skribis registritan leteron al la nederlanda adreso de sinjoro M., kiu revenis pro malakcepto flanke de la adresato. Mi sendis tiun saman leteron en dua pli granda koverto registrite al la angla adreso de sinjoro M. La letero en mia koverto revenis enmetita en duan pli grandan koverton de sinjoro M kun angla poŝtstampo de 6.12.79 - la ena eta koverto estis malfermita! Do estas plej verŝajne, ke sinjoro M estis leganta tiun leteron. Alia letero mia de 22.1.80 al sinjoro M en Anglio estis resendita ferma. Sama letero mia sendita pere de Eldonejo Kluwer revenis malakceptita laŭ letero de Eldonejo Kluwer de 1.2.1980. Mi ankoraŭ posedas tiujn leterojn kaj kovertojn. Do, se sinjoro M plendas pri ne-informo kaj ne-peto pri konsento, kion diri pri tio?

3. Se sinjoro Munniksma mencias en antaŭlasta alineo, ke "sinjoro Vogelmann ludas per la penso daŭrigi la laboron por la novaj eldonoj sen mia konsento", estas por mi certe, ke li estis en kontakto pri tiu afero kun prof. Lapenna, kun kiu mi plurfoje korespondis ekde 9.11.1979 petante la novan adreson de sinjoro M. Laŭvorte mi skribis al prof. Lapenna en letero de 28.2.1980: "Mi pripensas, ĉu mi devas daŭrigi la laboron por novaj eldonoj, serĉi responsulojn en ĉi lando, tradukantojn, presistojn, kontrolantojn, eldonistojn, zorgi pri harmoniigo ktp ktp kaj fine aperigi la novajn eldonojn sen la konsento de sinjoro M. Mi riskas ke poste li subite povas esti aktiva, nome kontraŭ mi. Eble mi havos poste multekostan, longtempan, ĉagrenigan proceson. Mi nun vere kredas, ke li estus kapabla je tio kaj mi vere bedaŭras lin pro tio

Sed sinjoro M skribas en HORIZONTO 28: "Obskureco ŝajnas karakteriza pri EKI (kiel nur? BV), ĉar nun sinjoro Vogelmann ludas per la penso daŭrigi la laboron por la novaj eldonoj sen mia konsento." Li plu parolas pri "malmorala malobservo". Do, la nura "pripensoj" pri realigo de bona afero eventuale kontraŭ obstina rifuzo de ne-kunlaborema sinjoro M estas malmorala kaj obskura!?

Pro tiu morala kondamno la leganto ne forgesu, ke per tiuj ne tute ĝusta mencio ĵ kaj ripetoj de miaj al profesoro Lapenna skribitaj vortoj sinjoro M



pruvas mem, ke mi klopodis informi lin kaj ricevisian konsenton.

4. Sinjoro Munniksma ne nur atakas min, sed ankaŭ atakas EKI, sinjoron Carlén kaj sinjoron Wensing. EKI estas Instituto por Esperanto en Komercio kaj Industrio kaj fondita post detala pridiskuto kun prof. Lapenna, tiama Ĝenerala Sekretario de UEA. Antaŭ la laŭleĝa fondiĝo de EKI la statuto estis preparolita kun estraranoj de UEA. Laŭ mia scio la unu-nura duba punkto de la statuto, kiun sinjoro M povus menci, estas la laŭleĝa sendependeco de EKI de UEA, kiu i.a. estis rekomendita de prof. Lapenna mem dum kunveno de prof. Lapenna, sinjoro Wensing kaj Vogelmann en Rotterdam proksime unu jaron antaŭ la notaria registrado, por plifaciligi la laboron de EKI. Tamen en la unua koncepto de la statuto EKI estis dependa organizo de UEA. Sed la estonta kaj planinta estraro de EKI decidis fine, ke la sendependeco povus garantii pli efikan laboron. Sinjoro Wensing sendis la novan statuton interkonsentitan inter la fondintoj de EKI al la CO de UEA. Sed ŝajnas, ke la prezidanto, prof. Lapenna ne ricevis aŭ ne atentis la ŝanĝojn. Kies kulpo? Mi ne povas hodiaŭ esplori tion. Ĉu gravas? - Fine ni tri EKI-estraranoj, sinjoroj Carlén, Wensing, Vogelmann oferis multegan monon, tempon, energion por evolui la por-Esperanto-laboron en ekonomiaj kampoj. Kun malmulta sukceso. La tempo ankoraŭ ne estis matura.

Ataki sinjoron Carlén, tiun noblan, ofereman viron, iaman vicprezidanton de UEA, kiu donis tiomege por Esperanto kaj por religiaj celoj, estas ago tute nekomprenebla. Sinjoro Carlén certe neniam estus aprobinta iun falsadon de statuto.

La misharmonion inter sinjoro Wensing kaj sinjoro Munniksma mi neniam komprenis. Ĝi estas persona afero de tiuj du personoj. Per multaj leteroj al ambaŭ, same al prof. Lapenna mi klopodis pacigi, sed vane. Estus tro amplekse, citi detalojn. Do, mi rezignas je tio. Sed estas triste, ke pro personaj miskomprenoj la bona afero de la Fakvortaro suferas.

5. La "ne-kapablo de EKI" prilabori novajn eldonojn de la IKF, estas pruvenda de sinjoro M. Ĉu li sola sur la mondo kapablas? Fakte la eldonisto Kluwer neĝuste interpretis tiurilatan rimarkon de sinjoro Wensing, kiu skribis al Kluwer, ke pro malagrablaj spertoj mankas al li la volo kaj kurago prilabori nuntempe novan eldonon.

6. Sinjoro M "ne povus toleri, ke EKI ...estu plu engaĝita en...daŭriĝo de la vortaro." Sed sinjoro M forgesas ke validas ankoraŭ kontrakto, al kiu EKI kaj sinjoro M estas ligitaj kaj certigas rajtojn al ĉiu kontraktanto. Kiu kontraŭagas kontraŭ litero kaj senco de la kontrakto, povas perdi rajtojn. Tion riskas sinjoro M. Cetere preskaŭ ĉiuj antaŭaj kunlaborantoj de la Fakvortaro jam konsentis pri la novaj eldonoj en aliaj lingvoj kaj rezignis je iu ajn pago por ebligi tiujn eldonojn, ĉar temas preskaŭ nur pri ekstereŭropaj landoj aŭ landoj kun devizaj malfacilaĵoj.

7. Pri la novaj eldonoj mem: kion diras sinjoro M, estas grava kaj priatentinda. Mi multe ŝatas liajn fakan scion kapablon kaj meritojn. Mi zorgeme atentis prilaborante tiun malfacilan taskon kaj salutis la kunlaboron de pliaj kapablaj personoj, ne nur de Esperantistoj. Estas rimarkinde, se sinjoro M skribas en lasta linio, ke li kontaktis du elstarajn Esperantistojn pri la pluekzisto